Gisto, Jan.2010 – (Kopiaĵo/rebako)
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
Redaktas ottovaske@ibest.com.br
Disdonata dum la Verda Kafo
Donace por ĉeestantoj.
Krom foraj loĝantoj, R$ 1,00

.....

AĜO DE LA VERDA KAFO

Kun la celo havigi al mi pli da spaco en mia domaĉo, mi traflaris miajn brokantaĵojn kaj trovis la kovrikpaĝon de teko donacita dum la 8ª Seminario de Esperanto. Ĝi okazis en Julio 1973, en la urbo Marília-SP. Tiu estas la evento kiun mi nun aludas, por indiki la komencon de nia tradicia renkontiĝo, evento al kiu ni, Karlo Dionizjo kaj mi, veturis per mia aŭto Variant'72. Dumvoje naskiĝis la ideo estigi renkontiĝon ĉiun semajnon. En la praktiko tamen montriĝis pli konvena, monata,pro distanco veturenda ĝis la ĉefurbo. Post unu tuta monato la sopiro revidi geamikojn estas pli intensa kaj tio helpos kunpeli pli da gesamideanojn. Do nia Verda Kafo aĝos 37 jarojn en la venonta Julio, sen interrompoj, sen krokodilado, danke al la fervoro de niaj diligentaj rondanoj.

MARBORDO

Somere nia amiko Arno kaj gefamilianoj pasigas kelkajn semajnojn ĉe la strando kaj eble dum tiu tempo li ne venos trinki verdan kafon kaj ne aperos en nia Skajp-renkontejo.

VIZITO EL LONDONO

La gaŭĉa embasadoro en Londono, nia diligenta samideano Lenio Marobin, jam anoncis sian venontan viziton al panjo kaj geamikoj, en la monato majo.La rondanoj vetas ke la fuŝulo denove mistrafos Verdan Kafon...hi...hi

SUR LA INSULO MARAJO'

Neniu leganto protestis kontraŭ miaj rakontoj pri okazintaĵoj dum mia flugista vivo, do jen plia memoraĵo. Ĉi venturo fakte okazis sur la granda insulo Marajo', pli precize, en la vilaĝo Kuralinjo. Per DC3-tipa (dumotora) aviadilo, ni ekflugis de Rio, por plenumi longan vojaĝon, dum tuta semajno inter iro al la plej norda urbo Makapa'kaj reveno al Rio, kun interrompoj por deflankiĝoj ekde Belem'. La skipo estis el bonegaj kompanoj : komandanto Heljo, piloto Nahilto, la « telegramisto,mi" kaj la stevardo Bruno. La tasko estis laciga. Ni devis surteriĝi preskaŭ ĉe ĉiu urbo troviĝanta laŭlonge de nia irvojo. Tial ĝi ŝerce ricevis la kromnomon "oni mortigas min". Unuan tagon, alvenintaj lacaj en Belem', neniu pensis promeni post la vespermanĝo ĉar sekvan tagon ni devis jam je la sesa ekflugi al Makapa' ĉ. 300 Km norden, tuj post la Ekvatoro. Tiu fakto al novuloj kostis kelkajn oferojn kaj ĝenanigan sindonon.Tion mi sciis kaj nun, kiel unuafoja transiranto de tiu imagebla "blua strio", mi mutiĝis esperoplena ke neniu el la skipo sciis ke tiu estas mia unua fojo. Sed...en tranĉeo ĉiam troviĝas "malamika" amiko, kiu ne perdas la bonŝancon vivi la ĝuoplenan cirkonstancon kaj denuncas la novicon por ĝui la spektaklan ŝercon. Kaj mi ne sukcesis eskapi el la bapto far la Reĝo Neptuno. Tial ke la surteriĝo okazas pokajn minutojn post kiam oni traflugis la nevideblan bluan streketon kiu duonigas la Terglobon, la ceremonio devis okazi ĉe la flughaveno de la urbo Makapa'. La viktimo-mi devis genuiĝi kaj esti baptita, firme tenata de la stevardo kaj piloto. Dume la komandanto reprezentis Neptunon. Oni

verŝis abundan kvanton da gvarano sur mian kapon. Li recitis misteran formulon kiu konsideris min de nun civitano plenrajta trafiki en la du hemisferoj, kondiĉe ke mi plenumos la ceterajn erojn de la novicado, tiu estas, surmeti kaj uzi medalon kiu memorigis min pri ĉi kompromiso. La medalo estis granda0 ronda biskvito kiu ricevis truon tra kiu oni metis ŝnureton por ke ĝi pendu sur mia brusto dum la resto de la tago. Mi anstataŭis mian blankan ĉemizon kontraŭ seka, pura kaj eltenis rikanojn de la kolegaroj kaj de amikoj kiujn oni renkontis survoje. Gajaj pasaĝeroj ankaŭ gratulis min kaj diris ŝercajn vortojn.

Komandanto Heljo lertis desegni inajn fugurojn. Tial li kunmetis interesan bildon pri la baptoceremonio, sur mian diplomon tiucele verkitan kun signaturoj de ĉiuj kompanoj. Ĝi nun pendas en mia radioĉambro je la dispono de kiu volas vidi la konfirmilon. – Nia ĉi-taga tasko finiĝis per la reveno kaj tranokto en Belem'. Nia pilgrimado daŭris sekvan tagon: al Manaus' kaj reveno al Belem', sen notoj indaj je mencio krom vizito al la ĉekaja foiro "Ver-o-Pezo". Ni ekrebobenas iun la imagan fadenon postlasitan dum la nordenflugo, nun kun la pruo hejmen, revidi gefamilianojn. La skipo agis eŭforie. La olda flugmaŝino inspiris fidon, nenio aparato misfunkciis, ĉio marŝis glate...polekso supren. Finmonate plia amaso da realoj dikigos la monujon. La sekva haltejo...Santarem'. Tie, replenigo de benzinujoj, kutimaj ekspedaj laboroj. Anekdotoj gajigis la rutinan deĵoron.Nun la nazon je 90°, al Belem'. Forta surprua vento iom bremsis nian rapidon. Kelkloke nia metala pasero ricevis banon pro pluvetoj. Tiam la liva motoro manifestis malkontenton, ne-plenronda, t.e. ĝi sentigis vibradojn, fortajn kiam oni testis la magnetojn.
(Daurigota).

VORTAROJ

Klerecon de homo oni evaluas laŭ la nombro da uzataj vortaroj kiujn li/ŝi posedas hejme. Kaj vi...kiom da ili vi uzadas?

AMARA KONSTATO

Eblas ke ĉiuj Gisto-gelegantoj nur rolas interesiĝon pri ĝia enhavo, eblas ankaŭ ke la cititaj legantoj verki etan tekston nalhavis tempon aŭ ne volas kunlabori. Iel ajn, tia sinteno neniel kontribuas por perfektigo sia kaj tio de la gaŭĉa movado. Lastaj sciencaj studoj insistas ke grizuloj devas enkapigi novajn sciojn. Ekz, dekstrulo manĝu per sia liva mano. Tia trejniĝo, oni asertas, riparas oldajn neŭronojn. – Karesema anoncis kunlaboraĵon. Ĝis 20/01, nihil... Nu, eble ĉiuj feriadas kaj turistas.

Por rideti – Far Arno, el K.G.

MODERNAJ INFANOJ

Ŝi proksimiĝis al la Bonoldulo kaj anoncis: mi estas Annjo.

- Jes ja, vi estas la bela Annjo, kion vi mendis de la Bonoldulo?

- Hu, ne diru ke vi ankoraŭ ne legis mian e-mejlon!

DIVENAĴO

Sur strate piediris tri gravuloj, honesta politikisto, malavida advokato kaj la Bonoldulo. Jen surtrotuare ili vidis 50 realan bankbileton. – Kiu el ili haste prenis la monon ? – Evidente, la Bonoldulo ĉar la aliaj tute ne plu ekzistas en Brazilo.

PETOLADO

Apud vilaĝo situis alloga argila kotejo. Post ioma kontraŭstaro la gepatroj permesis siajn infanojn libere petoli en tiu "porkejo". Sed, ho ve, estiĝis problemo. Iu foriranta patrino bezonis unue bani kvin knabojn ĝis ŝi sukcesis trovi sian propran etulon...